

Inĝenierarto Sen Limoj



“La Manifesto pri Akvo”

Per tiu ĉi retejo vi povos legi priekologiajn kaj prinaturajn artikolojn kaj tiel akiri interesajn konojn kaj samtempe alproprigi specifan vorttrezoron.

Premiso

La aliro al akvo estas homa rajto, agnoskita de Unuiĝintaj Nacioj kiel universala rajto, same kiel ekonomiaj, sociaj, kaj kulturaj rajtoj. La akvo, kune kun la aero kaj kun la sunlumo, estas nepraĵo por ĉiuj homoj kaj estas nerenoncebla kondiĉo por la vivorajto.

Tial ni konsideras akvon kiel komunan havaĵon, socian havaĵon kiun oni kundividu por eviti ke ĝi fariĝu kaŭzo de militoj kaj konfliktoj inter popoloj. Ekonomiaj havaĵoj, en la merkata funkciado, estas anstataŭigeblaj kaj elekteblaj. La akvo, ĝuste pro sia neanstataŭigeblo, ne povas esti konsiderata ekonomia havaĵo aŭ varo.

Tiel do ni kredas ke la komercado de akvo kaj la procezoj de privatigo de la akvaj servoj ne estas la ĝusta vojo por garantii tiajn specifaĵojn, precipe en tiuj landoj kie ne ekzistas sistemo de socia protektado.

La etika mastrumado de la akvo estas baza aspekto por la konstruado de “alia” estonto komuna al la tuta homaro. Tial ni opinias ke la regado de la akvociklo trarvideble garantiu la universalan aliron al tiu rimedo, inkluzive partoprenigajn meĥanismojn de la civitanoj kaj de la komunumoj en la mastrumado de la akvofontoj ĝis la akvopurigado kaj la kontrolo de uzitaj akvoj.

La aliro al akvo devus esti garantiata de la internacia komunumo surbaze de justecaj kaj solidarecaj principoj kaj per racia kaj daŭrigebla maniero de ĝia uzado.

Ni denuncas :

(Informoj el raporto: Beyond scarcity: power, poverty and the global water crisis – UNDP 2006 <http://hdr.undp.org/hdr2006/>)

- **ke pli ol unu miliardo da homoj en la mondo ne havas rektan aliron al pura akvo.** La manko de senriska akvofonto estas unu el ĉefaj kaŭzoj de malsano kaj de malriĉeco. Malpura akvo kaj manko de taŭgaj higienaj, sanitaraj servoj precipe respondecas pri 1,8 milionoj da mortantaj infanoj jare;

- **la evidentan malegalecon de aliro al akvo.** La individua konsumo de akvo en Usono estas meze 575 litroj ĉiutage, en Eŭropo 200-300 litroj, dum en la landoj de la sudo de la mondo oni vivas per malpli ol 10 litroj ĉiutage. Eĉ interne de la sama lando estas grandaj malegalecoj : la plej malriĉaj homoj ofte ne havas aliron al distribua reto de trinkebla akvo kaj estas devigataj provizi sin ĉe privataj revendistoj kiuj liveras malbonkvalitan kaj tre multekostan akvon. Ĉirkaŭ du trionoj de la homoj sen aliro al senriska akvofonto vivas per malpli ol du dolaroj ĉiutage. Unuiĝintaj Nacioj fiksas la minimuman necesokvanton je 40 litroj potage, dum la OMS asertas ke sub la sojlo de 50 litroj oni povas jam paroli pri sufero pro akvomanko;
- **laŭgradan redukton de la provizofontoj pro poluado kaj pro troa akvokonsumado.** Laŭ la UNDP-taksado, 1,4 miliardoj da homoj en la mondo loĝas en akvobasenoj kie konsumo de akvo transpasas la minimuman nivelon de la natura repleniĝo. Tio okazas plejparte en regionoj kiuj forte dependas de agrikultura produktado kaj kie akva kvalito endanĝeriĝis pro poluado (ekzemple en la altebenaĵoj de Nordameriko, en la nordo de Ĉinio kaj precipe en la sudo de Azio : en la ebenaĵo de la Gangorivero kie grandkvante ne ekzistas necesejoj, kio tiele poluegas la trinkavon de la loĝantaro (Fonto : World Toilet Organisation - *Monda Neceseja Organizaĵo*);
- **tro grandan kaj ne elteneblan konsumon de mineralakvo en boteloj.** La produktociklo kaj la konsumado de minerala akvo kunportas altegajn mediajn kostojn. Ĉiutage en la mondo oni malplenigas pli ol 200 milionojn da akvoboteloj kiujn oni transportas per kamionoj kiuj uzas fosilian fuelon. Ĉiu ne reciklata, ne reutiligata botelo bezonas 500 jarojn ĝis **malkomponiĝo**.
- **inertecon de internaciaj strukturoj.** Por atingi la '**Jarmilajn Celojn**' pri aliro al (trink)akvo kaj al sanitaraj servoj antaŭ 2015, oni bezonas 10 miliardojn da dolaroj ĉiujare. "**Tio povas aspekti imponan sumon**, sed ĝi estas relativa en ĝia kunteksto : tiu sumo estas malpli ol elspezas armeoj tutmonde dum kvin tagoj kaj ankaŭ malpli ol la sumon kiun oni elspezas ĉiujare en riĉaj landoj al minerala akvo", laŭ raporto de **UNDP** (2006).

Ni demandas :

- ke la aliro al akvo estu rajton sankciitan de lokaj, naciaj kaj internaciaj institucioj kaj garantigendan por ĉiuj homoj, tute senescepte. La akvokvanto estu tauĝa laŭ taksado kiun oni universale konsideras efika. Super tiu sojlo, ni petas ke la rajto je aliro al akvo estu kontrolata kaj mastrumata en maniero kiu malkuraĝigas malŝparon kaj maladekvatan akvokonsumadon;
- ke oni vidu la valoron de la akvo kiel komunan havaĵon de la homaro kiu estu ne reduktebla al varo kaj ne submetebla al komercaj kaj ekonomiaj interesoj;
- la protekton kaj la defendon de la teritorio kaj de la akvaj resursoj kiel prioritaton en nia konduto kaj en nia politika pripensado por sekurigi ke ankaŭ estontaj generacioj trovos viveblan planedon (principo de daŭripoveco);

- meĥanismojn kiujn ebligas al komunumoj partopreni en la mastrumado de akvoresursoj dank'al kontribuoj de civitanoj, samkiel de organizaĵoj aŭ reto de movadoj por realigi publikan instancon por senpera mastrumado;
- starigon de internacia fonduso asignata al projektoj kiuj ne nur fokusas sur la aliron al akvaj resursoj, sed ankaŭ sur teritoria mastrumado kaj sur la protektado de akvogeologiaj ekvilibroj;
- travideblecon en la mastrumado, per telekontrolado ('monitoring') de la administracioj kaj de la elektotaj investadoj flanke de la civila socio;
- la neceson vidigi la neceson raciigi la konsumon de akvo por agrikultura kaj industria uzado, pere de forigo de malŝparoj, de limigo de poluado de la grundakvo kaj per la alprenado de taŭgaj sistemoj de reutiligado kaj purigado;
- publikan, demokratikan kaj partoprenigan kontrolon de la akvaj servoj.

La itala branĉo de *Ingenierarto Sen Limoj* sin devontigas :

- subteni projektojn kiujn celas garanti la rajton al akvo samkiel iniciatojn kiujn pledas por ke akvo estu konsiderata kiel komuna havaĵo de la homaro;
- evoluigi edukadokampaniojn pri la ĝusta mastrumado de la akvoj, substrekante ke la protektado de niaj teritorioj eblas nur per la kontribuo de ciuj;
- edukadi la publikon pri konscia akvokonsumado, en kiu oni klarigu la mediajn sekvojn kiun kaŭza la utiligon en akvo en boteloj, por kuraĝigi homojn konsumi ĝin limigite kaj konscie;
- igi la civitanojn, la instituciojn kaj la mastrumantajn organizaĵojn sentemaj pri la neceso raciigi la akvokonsumon, precipe la konsumojn de akvo por agrikultura kaj industria celoj pere de pli efika konsummaniero.

Inĝenierarto Sen Limoj (ankaŭ Senlimaj Inĝenieroj, itale: Ingegneria Senza Frontiere – Firenze – ONLUS aŭ ISF-FI) estas ne-ŝtata, ne-profitcela asocio, konsistanta nur el volontuloj (studentoj, profesoroj, profesiuloj, spertuloj pri tekniko, ktp.) kiuj proponas siajn konojn en esplorado, formado kaj internaciaj kunhelpado-projektoj por plibonigi la vivon de la plej malriĉaj loĝantoj en la Sudo de la Mondo. Ĝia sidejo troviĝas en Florenco (Italio).

La teknikaj projektoj disvolviĝas precipe en Afriko (Kongo Kinŝasa, Ganao, Burkino) kaj zorgas pri energio, akvo, rubo, informadiko, ktp.. En multaj aliaj italaj urboj estas samcelaj asocioj. Ili partoprenas kunordigan reton. Ankaŭ en aliaj landoj oni estas homamaj teknikaj asocioj kiuj agas simile.

Legi pli sur Vikipedio : [Inĝenierarto](#)

Kontaktadreso en Esperanto : carlomatteini@libero.it